
# TEA-BULTENO

9a JARO | SEPTEMBRO - OKTOBRO 2005 | NUMEROJ 9-10


## Pluas nia festado!



TEA, parade vestita, plue iras sian vojon al celebrado de sia 100-jariĝo. Mi memorigas pri la pasintaj okazaĵoj: Solena Meso, Ekspozicio pri Esperantaj poŝtkartoj kaj 1a Internacia Somera Renkontiĝo. Estontaj programoj estos prelegoj de d-ro Bolognesi kaj prof-ro Pennacchietti, ĝemeliĝa ceremonio kun la grupo de Rijeka, solenaĵo honore al naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof, kursoj pri Esperanto k.a. Jes, ankaŭ okazigo de kursoj pri Esperanto estas taŭga maniero por festadi atingon de 100-jara vivo, kaj espereble, danke al vigla propagandado, ili estos AMASE vizitataj!
Do, ni invitas ĉiujn TEA-anojn kunlabori por inda realigo de ĉi planoj kaj nepre ĉeesti en la okazaĵoj.
Bone, pri la unuaj aranĝoj vi jam legis, pasintbultene, la komenton: nun, ĉi-sube por vi, la raporto de partoprenanto en nia Somera Renkontiĝo.

*TEA-Bulten-redaktanto Elda*

## Trieste invitis

Post la UK mi veturis al Trieste por partopreni en la 1a Internacia Somera Renkontiĝo (6–12 aŭgusto 2006). La kontrasto estis okulfrapa, de amasa kongreso al familia rondo. Ambaŭ havas siajn kvalitojn kaj logojn.

Kadre de la centjariĝo Triesta Esperanto-Asocio organizis tiun renkontiĝon sub la titolo „Inter Karsto kaj Maro". Jam la unua eldono perfektas, nur la vetero koboldis. Partoprenis kelkaj eksterlandaj esperantistoj kaj multaj lokaj.

La triestanoj fieras pri la urbo kaj mi nun bone komprenas la motivojn. Inter karsto kaj maro kuŝas moderna urbo kun mirindaj palacoj, longa strando, internacia haveno. Ekscitis min nur la motociklistoj, kiuj trakuris la stratojn kiel banditoj, sed same estis en Florenco.

Oni avertis kunporti bonajn ŝuojn. Prave, la migrado en la valo Rosandra postulis tion, ĉar la ŝtona pado glitis. Post streĉa marŝado ankoraŭ viziti gigantan groton, estis elĉerpige. La organizantoj sukcesis lacigi la gastojn tiel ke ili bone dormis malgraŭ strata bruo pro aŭtoj.

Naĝado kaj sunumado ĉe la maro estis antaŭvidita dufoje, sed okazis nur unufoje pro ŝanĝema vetero. La triestanoj preskaŭ malesperiĝis, ke ne eblis promeni sur la fama pado de Rilke pro pluvo. Tamen tio ne povis forpeli la gajecon de la grupo.

Ni ekskursis dufoje per ŝipo. Al Duino por la vespera spektaklo „La najtingala fortikaĵo", kiu kreis misteran etoson pro la lumigitaj rokoj kaj kastelo, kaj la sorĉaj voĉoj kaj muziko. Kiam ni revenis tagojn poste dumtage ni povis solvi la enigmojn de la historio. La dua ŝipekskurso kondukis al la urbeto Muggia, vidalvide de Trieste.

Vole-nevole ni vizitis sub la firma gvido de Elda kaj Edvige ĉiujn interesajn lokojn kaj preĝejojn de la urbo, eĉ la defian ekspozicion pri Andy Warhol! Kaj ne laste ni gastis en la domo de Anita Altherr super Trieste. Plej impresis min la Placo de la Unuiĝo kun la registaraj domegoj, la kastelo de Miramar kaj la koreco de la gastigantoj. Mi deklaris la renkontiĝon plene sukcesinta.

***Bruno Graf***

## Septembra Programo

| | |
|---|---|
| 02 - vendredo | 20.00 - Unua postferiada renkontiĝo |
| **05- mardo** | 11.00 - Gazetara Konferenco en *Caffè Tommaseo*, pri "Kurta KinoEsperanto Festivalo" |
| 08 - vendredo | 20.00 - Verboj kun prepozicioj: tradukado al itala |
| **10 - dimanĉo** | Festo de Amikeco sur Monto Forno |
| 12 - mardo | 20.00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA |
| **13 - merkredo** | 14.40 - Programmi dell'accesso Radio 1 |
| 15 - vendredo | 20.00 - Tradukvespero: la vidado |
| 19 - mardo | 20.00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA |
| 22 - vendredo | 20.00 - Niaj pioniroj: Valdemar Langlet |
| 26 - mardo | 20.00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA |
| 29 - vendredo | 20.00 - Kartludado |

## Oktobra Programo

| | |
|---|---|
| 03- mardo | 20.00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA |
| 06 - vendredo | 20.00 - *Lecturae Dantis* esperante, itale, triestadialekte |
| 10 - mardo | 20.00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA |
| **11 - merkredo** | **17.30** - Sala Baroncini - Via Trento 8<br>La homo elpensas la lingvon. Originoj de la homa kultura interkomunikado.<br>*Prelego de d-ro Romano Bolognesi* |
| 13 - vendredo | 20.00 - Prezento de baza kurso de Esperanto |
| **17 - mardo** | 17.30 - Sala Baroncini - Via Trento 8<br>La homo elpensas la numerojn. Origine de l' nombrado kaj kalkulado.<br>*Prelego de d-ro Romano Bolognesi* |
| 20 - vendredo | 20.00 - Somero en Esperantujo - diapozitivoj de Anita |
| 24 - mardo | 20.00 - Preparoj por 100-jariĝo de TEA |

| | |
|---|---|
| 27 - vendredo | 20.00 - Litovio, malkovrinda lando filmo de Edvige Ackermann |
| **31 - marto** | 17.30 - Sala Baroncini - La homo elpensas la kalendaron. Origine de la kalendaro. *Prelego de d-ro R. Bolognesi* |

## Unika evento por la Esperanto-Movado!

La urba konsilantaro de Herzberg en Germanio voĉdonis la 11[an] de julio, el kio rezultis, ke la nova oficiala nomo de la urbo fariĝas:

**Herzberg am Harz,**
**die Esperanto-Stadt/la Esperanto-urbo!**

La urbo, en ĉiu kampo, fiere subtenas kaj, laŭ sia kapablo, antaŭenigas la uzadon de Esperanto por neŭtrala internacia interkompreniĝo, kaj planas uzi la lingvon por montri al la mondo siajn homajn, turistajn, ktp valorojn.

Kion la urbo jam faris kaj daŭre faras por kaj en Esperanto?

★Esperantlingvaj urbaj vojmontriloj montras al la Esperanto-Centro;

★la oficiala leterpapero de la urbo surhavas la novan nomon: Herzberg - la Esperanto-urbo;

★Esperanto estas uzata por la ĝemelurbaj kontaktoj;

★E-arkivejo funkcias en la malnova urbodomo;

★partatempa dungito de la urbo zorgas pri Esperanto-rilataj aferoj (kunorganizas programojn, disdonas Esperantajn afiŝojn, alvokojn por programoj, ktp.);

★la urbo provizas (senpage aŭ ege favorpreze) ejojn por Esperantaj kursoj, konferencoj, kunsidoj, renkontiĝoj, koncertoj, ktp;

★en ĉiuj lernejoj de la urbo oni instruas Esperanton (en la lernojaro 2005/2006 ĉ. 100 gelernantoj).

Kaj nun kelkaj ekzemploj, pri kie kaj kiel Esperanto ĉeestas en la Esperanto-urbo:

★ Esperanto-Gesellschaft Südharz aktivas jam de 30 jaroj, kunligas esperantistojn de la urbo kaj regiono;

★ Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro ofertas tutjaran programon kun lingvokursoj je ĉiuj niveloj, seminariojn, konferencojn; kaj, kiel klerigejo de GEA, klerigas kaj pluklerigas E-instruant/istojn;

★ Esperanto-biblioteko, video- kaj gazetarkivo estas tutjare vizitebla, uzebla por studado, esplorado, ktp;

★ ekzamenejo por Germana Esperanto-Instituto kun 2 rajtigitaj ekzamenantoj, porokaza oferto de UEA/ILEI-ekzamenoj;

★ interkulturaj vesperoj por neesperantista publiko.

Kompreneble estas kaj estos multaj aliaj farendaĵoj, por ke dum la venontaj monatoj kaj jaroj ni kune kreu taŭgan Esperanto-infrastrukturon kaj por nia movado kaj por la piloturbo Herzberg. Oni bezonas ĉies subtenon, ideojn, amasmediojn, ktp por bonkvalite merkatumi tiun unikan bonŝancon por Esperanto. Eventualaj gratulleteroj povus esti bona, tuja subteno. Bonvolu adresi ilin al la urbestro Gerhard Walter:

buergermeister@herzberg.de

sendante samtempe kopion al: esperanto-zentrum@web.de.

Kelkaj ĉi-rilataj fotoj videblas ĉe:

http://fotos.web.de/interkultura-centro/Esperanto-urbo

Informis: Germana Esperanto-Centro
Interkultura Centro Herzberg -
Grubenhagenstr. 6 - D-37412 Herzberg/Harz
Tel: +49/(0)5521-5983 - http://www.ic-herzberg.de

## NOVA ESPERO FRIULI FESTAS!!!

De la 17[a] ĝis la 22[a] de oktobro, en *Lignano Sabbiadoro*, okazos Nacia Kultura Manifestacio, organizita de Fervojista Libertempa Asocio en Udine. NOVA ESPERO FRIULI, Kultura Sekcio de tiu Asocio, tie prezentos la jenan programon:

- Prelegoj de d-ro Serio Boschin kaj d-ro R. Bolognesi
- Esperantlingva Meso, celebrita de pastro Nello Marcuzzi
- Filatela ekspozicio pri Esperanto-poŝtmarkoj kaj stampoj
- Ekspozicio pri Esperantlingvaj libroj
- Emisio de speciala poŝta karto honore al la 25[a] fondiĝdatreveno de NOVA ESPERO FRIULI kaj de porokaza stampo.

Pliaj informoj ĉe TEA-sekretario.

## *La Angla en Eŭropa Unio: lingva kaj kultura eko-katastrofo!*

Chiti-Batelli, intervujita de DISVASTIGO por artikolo publikigita poste en la ĵurnalo *"La Cronaca d'Abruzzo"*, pasintjunie, insiste argumentas, ke por Eŭropa Unio necesas intergenta lingvo kaj ke tiu lingvo tute ne povas esti la angla, kiu ĉiutage konkeras pli kaj pli da tereno en ĉiu kampo de la ekonomia kaj socia vivo. Nu, ne temas pri eksterordinara novaĵo por la plejmulto el la legantoj, kiuj tute ne donas gravecon al lingvaj problemoj kaj ja konsideras la anglan lingvon kiel de ĉiuj akceptita solvo por interhoma komunikado, sed Chiti-Batelli malkovras la danĝerecon de tiu fakto, tio estas survojiĝo al detruado de aliaj lingvoj kaj kulturoj, laŭ la leĝo de socilingvistiko kiu antaŭvidas la superecon de lingvo apartenanta al hegemonia potenco kaj havanta ruinigajn efektojn super la aliajn.

Laŭ Chiti-Batelli la apogantoj de la angla, precipe la lingvoinstruistoj, silentas aŭ eĉ hipokrite subtaksas ĉi aspekton. La eksa ministro pri publika instruado, Tullio De Mauro, renoma lingvisto, deklaris ke "la angla lingvo havas transglotan funkcion kaj tia lingvo neniam povus forviŝi la aliajn" kaj ankoraŭ "Ni ne troe maltrankviliĝu: prikonsideru, ke kiam la latina trudiĝis kiel oficiala lingvo de unu ekstremo al alia de Eŭropo, intertempe naskiĝis la romancaj". Al tio li reagas, klarigante pri la historio de la latina kaj responde al la deklaroj de prof-ro De Mauro: "La latina iĝis terure lingvovora kaj, en la antikvaj tempoj ene de Eŭropo, eltranĉis eĉ la radikojn de la lingvoj de popoloj kaj teritorioj apartenantaj al la Romia Imperio, malaperigante interalie la lingvon de la Etruskoj. Kiam la lingvo de Romio ĉesis esti lingvo de Imperio kaj – kio eble eĉ plej gravas – ne plu funkciis kiel gepatra lingvo de popolo, ĝi tamen povis pluvivi, dum pluraj jarcentoj, kiel lingvo de kulturo, de scienco kaj de la Eklezio, ne malebligante tiel la evoluadon de la vulgaraj kaj aliaj lingvoj de la Malnova Kontinento: ties lingvo-vora efiko en Mezepoko entute ĉesis".

Poste, li aldonas, ke la nura savebleco povus deveni de lingvo nenies gepatra kaj tial ĝi povus iĝi intergenta lingvo, tute ne minacanta la ekzistadon de la aliaj, en ilia plena respekto kaj protektanta ilian konservadon, kaj simila lingvo, jam uzopreta, povus esti nur Esperanto. Kaj kio pri la sociolingvistiko? Jen la kerno de la proble-

mo: "Nunatempe al esperanto mankas politika forto, kapabla ĝin antaŭenpuŝi". Eŭropa Unio povus esti tiu antaŭenpela forto, nur kiam ĝi iĝos vera federacia Ŝtato, bezonanta en sia eno federacian oficialan lingvon, neniun ajn privilegiantan, kaj en la eksteraj rilatoj konscia pri la bezono konstraŭstari la hegemonion de la angla, hegemonion ne nur lingvan sed ĉefe politik-superpotencan.

Al demando, ĉu en ĉi momento nur oni devas atendi pasive la establon de Eŭropa Federacio, Chiti-Batelli respondas:

"Tute ne. Jenan strategion mi ŝatus sugesti: akcepti ĉi-momente la anglan, ĉar ne ekzistas aliaj eblecoj, pro la nuna ekvilibro (aŭ - pli bone dirite - malekvilibro) de la internacia superregado. Sed samtempe konsilindas, klopodi kontraŭstari, denuncante la tre seriozajn riskojn al kiuj sin elmetas, en tre mallonga tempo, ne nur lingvoj, sed eĉ kulturoj de la eŭropaj popoloj, kiuj, sen la idiomoj per kiuj ili sin esprimas, iom post iom estos neniigitaj kaj eniros plate unuforman anglecan universon. Plie engaĝiĝi, firme kaj plenkonvinke favore al realigado de la Eŭropa Federacio, kunlaborante aktive kun tiuj movadoj, kiuj tion alcelas. Urĝas tamen tuj aktiviĝi, alimaniere tre baldaŭ oni atingos la punkton de nerevenebleco. Sekve necesas tuj ekbatali, energie, ĉiam havante antaŭ la okuloj la celpunkton: la pluvivadon de "Eŭropa identeco", konsistanta ĝuste en la plureco de ĝiaj lingvoj kaj kulturoj. Ni malhelpu, ĝis kiam estos tempo por tion fari, ĉi tiun lingvan eko-katastrofon, kiu pli kaj pli, ĉiam pli proksime nin minacas: ĉi minaco je disfaliĝo estas same grava kiel la media eko-katastrofo, ankaŭ pro la fakto ke pri ĝi la plejmulto ankoraŭ ne ekkonsciiĝas".

*Giorgio Bronzetti www.disvastigo.it*

## Vikipedio: Kio ĝi estas?

*Informas Ulrich Matthias*

Vikipedio estas gravega projekto por Esperanto pro pluraj kialoj:

* Unue, Vikipedio ebligas al esperantistoj facile kaj senpage trovi interesajn artikolojn pri ajna temo. Ĉar en Vikipedio regas demokratiaj principoj kaj ĉar principe ĉiu rajtas kunlabori, la artikoloj estas kutime pli neŭtralaj ol ordinaraj retpaĝoj. Foje oni trovas en Vikipedio eĉ informojn, kiuj estas malfacile troveblaj en la plej multaj naciaj lingvoj.

* Due, Vikipedio estas ideala medio por evoluigi la esperantan terminologion. Mi mem komencis aktivi en Vikipedio en februaro 2006, kiam mi konstatis, ke la reta serĉilo *Google* trovas 10 milionojn da artikoloj pri la angla nocio "Accounting Standards", dum pri ĝiaj esperantaj ekvivalentoj "Kontadaj normoj" aŭ "Librotenaj normoj" ĝi trovis nur unu mencion. Mi tiam ekverkis en Vikipedio la artikolon "Internaciaj kontadaj normoj", paŝante sur novan terenon, kie Esperanto ĝis tiam ne estis uzata. Kiam multaj esperantistoj en la mondo rigardas en Vikipedio pri artikoloj el siaj fakoj kaj klopodas plibonigi aŭ ekverki tiajn, la esperanta terminologio rapide progresas. Tre utilaj estas la vikipediaj ligiloj al la samtemaj artikoloj en aliaj lingvoj. Se iu deziras prelegi aŭ verki en Esperanto pri iu ajn temo, jam nun estas bona ŝanco, ke taŭgajn terminojn (kaj bazajn informojn pri la afero) li trovas en Vikipedio.

* Trie, danke al Vikipedio multaj neesperantistoj ekscias pri Esperanto. Jam nun, ĉe centmiloj da Vikipediaj artikoloj en naciaj lingvoj, videblas la informo, ke ĝi haveblas ankaŭ en Esperanto (per simpla musopremo). Kune kun la malnovaj versioj de la artikoloj, temas entute pri dekoj da milionoj da artikoloj. Kiam eksteruloj asertas, ke Esperanto ne estas tre disvastiĝinta, ni nuntempe povas fiere rakonti pri la 160 milionoj da artikoloj, kiujn *Google* trovas laŭ la serĉvorto „Esperanto". Fakte entajpante tie "+Esperanto+Wikipedia", ni vidas, ke ĉirkaŭ 90% de tiuj ĉi artikoloj ni dankas al Vikipedio.

Por ke la Esperanta Vikipedio ankoraŭ pli kresku kvante kaj kvalite, necesas ankoraŭ pli da kunlaborantoj ol la ĝisnunaj ĉirkaŭ 2.000, el pli ol 50 landoj. "Tio estas bona ekzemplo de vera internacia kunlaboro", tiel diras Chuck Smith, la fondinto de la Esperanto-Vikipedio. Oni povas komenci la kunlaboron per korektado aŭ ampleksigo de ekzistantaj artikoloj; oni facile komprenas la funkciadon kiam oni, elirante de la paĝo eo.wikipedia.org, rigardas kelkajn artikolojn. Multaj homoj rapide ekŝatas Vikipedion pro ties bona teknika funkciado. Eĉ la esperantaj supersignoj kutime ne prezentas problemon, ĉar sufiĉas tajpi ĉ, ĝ ktp por fine ĝuste vidi ilin. Por verki novajn artikolojn, oni povas plej facile komenci per urboj, riveroj aŭ famaj personoj.

Mi esperas, ke, por uzi vortojn de Zamenhof el la "Dua Libro" pli kaj pli da esperantistoj "rapidas porti sian ŝtonon por la granda, grava klaj utilega konstruo".

**Adreso de la Esperanta vikipedio:**
**http://eo.wikipedia.org**

**Esperanta Vikipedio havas jam pli ol 50.000 artikolojn!** Ĵus ĝi superis 50.000 artikolojn en la reto. Ĝi do havas la rangon 15an el inter entute 229 lingvoj, kiuj nun estas uzataj de la reta enciklopedio. Tiel la internacia lingvo Esperanto eĉ estas antaŭ lingvoj kiaj la bulgara, ĉeha aŭ dana. La germana havas pli ol 428.000 artikolojn, la angla eĉ pli ol 1,4 milionojn da artikoloj.

**Ulrich Matthias (Wiesbaden, Germanio)**
<Ulrich.Matthias@t-online.de>

## Kurta KinoEsperanto Festivalo

Celebre de la 100-jariĝo de Triesta Esperanto-Asocio, oni lanĉas Internacian Konkurson, pri kurtfilmoj ital-kaj/aŭ esperant-lingvaj, aŭ alilingvaj sed kun surskribaĵoj en la itala aŭ esperanta lingvoj. La kurtfimoj povas esti ankaŭ senparolaj. Daŭro de la filmo, en formo de DVd aŭ VHS, ne superu 15 minutojn. La verko estu sendita antaŭ la 15a de decembro 2006, en registrita koverto kaj kun ricevatesto, al jena adreso:

**ESPERANTO TRIESTE**
**C.P. 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro**
**IT-34132 TRIESTE - Italia**

La verkoj estos prezentataj al publiko okaze de la Semajno de Internacia Amikeco (19-25 februaro 2007). Aljuĝos la premion al unuaj tri klasifikiĝintaj ĵurio konsistanta el 5 personoj elektotaj kaj el la ĉeestonta publiko. Regularo, aliĝilo kaj aliaj informoj haveblas ĉe TEA-sekretario, poŝte, rete, telefone.

Rete: nored@tiscalinet.it kaj
ĉe www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/

## Mallonge pri... *Poŝtmarko kun portreto de Kalocsay.*

Kalocsay Kálmán, unu el la plej elstaraj Esperantaj literaturistoj forpasis la 27an de februaro en 1976. Danke al la zorgado de s-ino Csiszár Ada (kal-csi@drotposta.hu), okaze de la 30a datreveno de lia morto estis produktita personigita oficiala poŝtmarko ĉe la Hungara Poŝto en valoro de 50 hungaraj forintoj. Ĝia foto estas videbla ĉe: http://www.esperanto.hu/aktualis.htm

***Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj.*** Esperanto-bibliotekoj havas denove ŝancon akiri senkoste librojn, kiuj mankas en iliaj kolektoj, ĉar, jam por la deka fojo, UEA disdonos subvenciojn de la BIBLIOTEKA APOGO ROMA KAJ POUL THORSEN. Por subvencio rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesitaj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. La subvencion oni ricevos kiel librojn surbaze de la listo, akompaninta la peton. En la jaro 2005 sep bibliotekoj ricevis subvenciojn, kiuj valoris 80 ĝis 225 eŭrojn. La petoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15a de oktobro 2006.

***Aktivas ttt-ejo www.arciesperanto.it!*** En la sekcio *"Associazioni"* (Asocioj) konsulteblas la Statuto de *Arci* esperantlingve, plie jam tradukita la alvoko: "For la atombombojn el Italio, for la atombombojn el Historio!" Alcele *ARCI ESPERANTO* ekigos kursojn pri Esperanto, por krei grupon de aktivaj geesperantistoj, dezirantaj diskonigi la celojn de tiuj asocioj en internacia kampo: ĉiuj kune al demokratia komunikado, ĉiuj samrajte kaj samnivele sur la internacia scenejo!

*- Informis Andrea Montagner Arci Esperanto*

## 100-jariĝo de Centro Esperantista Milanese

**TUTTI MOBILITATI : IL NOSTRO CIRCOLO HA 100 ANNI!** Occasione unica, irripetibile: il finesettimana dell'11-12 di novembre, insieme agli amici italiani e non, festeggeremo il secolo di vita del CEM e dell'esperanto a Milano. Il programma prevede un sabato intenso con una cerimonia ufficiale al mattino, con la partecipazione di note personalità, nel salone del Museo di Storia Contemporanea messo a disposizione dal Comune. Seguirà un rinfresco, prima di un pomeriggio variegato da temi diversi: storico, culturale, musicale, ecc. Una cena completerà l'intensa giornata. La domenica visita della città. A parte la cena, il programma non prevede oneri per i partecipanti. Infine è quasi certa una anticipazione musicale presso il Conservatorio al venerdì sera. **Ni varmkore atendas vin ĉiujn!!!**



vanità

**Ina vestaĵaro**
**Ĉio por novedzino**

**VANITÀ sas**
di Dodi B. & Dei Rossi R.
34122 TRIESTE
Corso Italia, 37 - Tel. 040 632340
Cod. Fisc. e part. IVA 00082530320


## SOLVO DE LA KVIZO APERINTA EN MAJO 2006

### Kvizo de Bardhyl - la falsa monero



*Surtable estas entute 80 moneroj, el kiuj nur unu estas iom pli malpeza (ni diru, ke ĝi estas falsa). Ĉiuj aliaj estas tute sampezaj kaj kompreneble ĉiuj moneroj estas samaj laŭaspekte. Mi disponas pri pesilo je du pesiltasoj sed sen peziloj.*

*Ĉu vi kapablas diveni, kiom da pesigoj estas bezonataj por ke ni sukcesu distingi la falsan moneron?*

*Ĝenerale, se ni havus N-monerojn, kiom da pesigoj estus bezonataj?*

**Solvo:** Ni disdividu 80 monerojn en tri grupojn po 27 moneroj. Ni prenu du grupojn kaj surmetu po unu el ili en ĉiu pesiltaso. Se rezultiĝas ekvilibro, ni lasu tiujn du grupojn kaj prenu el la tria grupo tri subgrupojn el 9 moneroj. Ĉi lastajn ni surmetu sur la pesiltasojn, po unu subgrupo en ĉiun el ili. Se rezultiĝas denove ekvilibro, ni lasu flanken tiujn du subgrupojn kaj prenu la lastan subgrupon el 9 moneroj. Tion ni dividu en tri egalajn partojn kaj prenu du partojn, por ke ni surmetu ilin sur la pesiltasojn denove. Se rezultiĝas ekvilibro post la tri pesigoj, kompreneble ni scias ke la falsa monero troviĝas inter la tri lastaj moneroj. Ni prenu du el ili kaj surmetu po unu en ĉiun pesiltason. La kvara ekvilibro pruvas, ke la lasta monero estas la falsa, kontraŭe tiu estas la malpeza el du unuaj.

**Ĝeneraligo**: Se estus N-moneroj, la nombro de pesigoj estas **k**, tia ke $3^{k-1} < k < 3^k$. Ekzemple N=200, tiam k = 8 ĉar $3^{8-1} = 3^7 = 128 < 200$, $3^8 = 256$

★ ★ ★ ★ ★

Tri estis la konkursintoj, respondintaj ĝuste, sed premio ununuras, kaj do, lotumado decidis la gajninton, nome denove samideano Ermigi Rodari el Milano, kiu ricevos interesan esperantaĵon.

---

**Divenaĵo de Viglo: Aŭtunaj folioj**
Solvo: LA TEO-INFUZADO



## Dimanĉon la 10an de septembro
## Festo de Amikeco ĉe Dreiländerecke

La tradicia renkontiĝo sur Monto Forno estas jam proksima: ĉu denove ni surgrimpu tiun altaĵon, por vagadi de unu lando al alia, ĝui belan naturon, gustumi aŭstrajn, slovenajn aŭ italajn manĝaĵojn, kunveni kun esperantistoj?

Se jes, varme ni invitas vin tuj anonci vian partoprenon, por planado de kunvojaĝo, ĉe TEA-sekretario; telefone: sideje 040 763128 (marde kaj vendrede - 19.30-22.00), hejme 040 398562 aŭ rete: testudo@adriacom.it.


BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
**Grupa ttt-ejo**: ://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
**Poŝta adreso**: CP 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro
IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349